Tio ĉi estas speciala aliĝilo por loĝantoj de latinamerikaj landoj kun speciale rabatitaj kotizoj.

Loĝantoj de Brazilo pagu al la aliĝ-adreso (BEL). Loĝantoj de aliaj landoj pagu al UEA aŭ kiel kutime (al siaj landaj perantoj aŭ simile).

La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2002. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (nur por aliĝkategorio C)	**ĝis 01 12 31** 1-a periodo	**ĝis 02 03 31** 2-a periodo	**ekde 02 04 01** 3-a periodo
Valuto	EUR	EUR	EUR
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	75	90	110
2. ne individua membro de UEA	90	110	135
3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	40	50	60
4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	55	70	82

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 72 01 01 kaj 81 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:
– infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 81 12 31;
– nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): *"8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK."*

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

Se vi pagas al LKK aŭ peranto, sendu ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.